

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Ĝis revido, s-ro Glauco Pompilio!

Por pli ol 50 jaroj, s-ro Glauco Pompilio estis ĉe ni. Li tamen estos baldaŭ for, kiel montras la suba mesaĝo. Bonan vivon ni esperas al li en Italio!

Konsiderante nian tre "altan" aĝon, mia edzino kaj mi decidis pasigi la estontajn jarojn de nia vivo - mi ne diru la lastajn - sub la helpo de nia filino. Kaj ĉar nia filino loĝas en Italio, ni decidis transloĝiĝi tien.

Kaj tio okazas post pli ol kvindekjara restado en Japanio. Kvindek jaroj plenplenaj de interesaj kaj agrablaj spertoj, danke ankaŭ kaj ĉefe al japanaj esperantistoj kaj samideanoj. Estas ili per tiu ĉi mallonga mesaĝo en "La Tamtamo" kiujn mi volas plej sincere danki pro ilia amikeco dum tiom da jaroj.

Kun la dankoj mi sendas al ĉiuj miajn plej korajn salutojn esperante iam renkontiĝi ie en la Esperanto- mondo.

Glauco Pompilio



el "Novaĵoj Tamtamas" n-ro 261

Niaj klasoj

***Eseoj:** gvidas Doi Hirokaz, ĉe la Muzeo, en sabato (horoj ne fiksitaj).

Lastatempe oni legas "La somero de ĉi tiuj infanoj", pri la atombombitaj infanoj en Hirosima kaj Nagasaki.

***Tekstantoj:** gvidas Doi Ĉieko, per Zoom, en lundo de 16:00 ĝis 17:00

Nun legata estas "Lumo kaj Ombro", originale esperantaj verkoj de Vasilij Eroŝenko.

***erikoj:** gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, en merkredo de 13:30-15:30.

Lastatempe oni intence ne kunvenas pro la Kronviroza situacio.

***Jokohama Salono:** sen gvidanto, per Jitsi, en sabato 15:00-17:00.

Principe la 1-an kaj la 3-an sabaton de monato oni legas "La Ŝtona Urbo". La 2-an sabaton oni interkritikas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni interkritikas sian tradukaĵon el materialo libere elektita.

***Daŭriga kurso:** gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, en nefiksita tempo, al unu lernanto.

Oni legas el la gazeto "Esperanto" de UEA.


La Jaro de Tigro

Akiya Hideo

La jaro 2022 estas la jaro de tigro. En orienta kalendaro, diversaj bestoj estas asignataj cirkle al ĉiu el dek du jaroj. Do, laŭ sia naskiĝjaro, ĉiu homo havas propran simbolan beston. Tigro estas ja mia. Tial mi elektis bildon de tigro por mia desegno de la novjara karto por 2022.

En la fino de la pasinta jaro, mi cerbumis por trovi taŭgan bildon por la karto, kaj mi fine decidis selekti unu el la fotojn, kiujn mi fotis antaŭ kelkaj jaroj en la najbara zoologia ĝardeno "Yokohama Zoorasia." Tie mi vidis tri tigrojn, kaj du el ili estis junaj. La du junaj ĉasis kaj luktis unu kontraŭ la alia. Kompreneble, ili ludis por amuzo. La adolta tigro de tempo al tempo proksimiĝis al ili kaj rigardis apude kion ili faris.

La fotoj rememorigis min, ke en tiu vizito mi sentis nekontentiĝon, ĉar la tigroj aspektis iom tro mildaj. Ilia tre familia atmosfero havis nenion sovaĝan. Ili ne montris aktivajn movojn. Mi neniam aŭdis iliajn kriegojn kiel sovaĝaj rabobestoj. Estis vere paca sceno. Tio estas bona. Sed tio ankaŭ sentigis al mi ke ne estis nature. Eble mi atendis ke mi vidus iom pli sovaĝecan naturon.



La zoo Zoorasia situas en la norda suburbo de Yokohama kaj havas pli ol 50 hektarojn vastan terenon. Ĝi estas unu el la plej grandaj zooj en Japanio. Mi bezonis pli ol unu horon por rondiri la tutan ĝardenon. Spektantoj povas vidi multajn bestojn sub libera ĉielo. Ili aperigas sin en sia propra zono, kiun fosoj apartigas de la pasejoj por spektantoj.

La zonoj estas planitaj esti similaj al la medioj de specifaj bestoj kun plejeble granda spaco. Verŝajne tiu intenco preskaŭ sukcesis. Tamen, mi sentis tiam, ke la zono por tigroj ne estas sufiĉe granda. Proverbo diras, "La tigro iras kaj revenas mil liojn* da distanco (ĉ. 500 km) dum tago: 虎は千里行って千里帰る." Kompreneble, tiu distanco estas troigo.

Mi ne scias kiom longe tigro kapablas kuri aŭ paŝi dum tago. Sed certe, la zono de la tigroj estas multe pli mallonga ol kilometro. Do, al ili absolute mankas vasteco de la spaco. Eblas, ke pro tio la bestoj ŝajnis malviglaj.

Nuntempe endanĝerigitaj specioj de sovaĝaj faŭno kaj flaŭro estas protektataj laŭ Konvencio de Vaŝingtono kontraŭ internacia komercado. Sovaĝa tigro estas unu el tiaj specioj. Tial, estas malfacile akiri nove individuojn de tiaj bestoj el iliaj originaj landoj, kvankam zooj en la mondo certe bezonas tion por daŭre teni sin.

Do, oni provas naskigi kaj kreskigi la idojn en sia ĝardeno, aŭ klopodas por gajni ilin de aliaj enlandaj zooj. Tiu tendenco nepre multigos denaske malsovaĝajn bestojn. La du junaj tigroj, kiujn mi vidis, probable ne konas la arbaron kaj monton, kie iliaj gepatroj aŭ geavoj foje vivis.

Bedaŭrinde, ĉi tiu situacio ne feliĉigos la bestojn mem kaj ankaŭ la vizitantojn. La bestoj ne povas ĝui sian liberan vivon kun sovaĝa animo, nek la vizitantoj povas ĝui la spektaklon de aktivecplenaj bestoj.

Cetere, en la frua januaro ĉi-jare min teruris la novaĵo pri la mizera akcidento en la besto-ĝardeno "Nasu Safari Park." Unu tigro atakis tri bestozorgistojn kaj ili grave vundiĝis, unu zorgistino eĉ perdis sian manon. Onidire, tio okazis pro misŝlosado de la kaĝo. Ho ve! Kia jaro de tigro!

Sovaĝaj vivaĵoj estas tio, kion homoj delonge

timis kaj respektis. Ambaŭ havis siajn proprajn teritoriojn malkune. Kiel diras alia proverbo, “Delasu tigridon en ĝia monto: 虎の子は山へ放せ,” estas bone lasi ĉiun troviĝi en ĝia natura, origina loko. La naturon homoj ne povas tute

regi, nek povas manipuli laŭ sia volo, nek povas konformigi al sia deziro. Lasu naturan beston vivi en la naturo.

* lio: ĉina unito de distanco, ĉ. 500 metroj. (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Lio>)

Prezento pri “Ecostore Papalagi”

Murata Kazuyo

S-ro Takemoto Masahiro 65 jaraĝa laboris kiel profesia plongisto dum 40 jaroj. Fotante per subakva kamerao, li prezentis belegajn submarajn pejzaĝojn, marajn plantojn kaj animalojn: nekredible ĉarmajn fiŝojn, krabojn, salikokojn, konkulojn, kaj koralaj-rifojn, k.a.

Komencajn 20 jarojn li multe ĝuis la belecon de mara pejzaĝo, kaj postajn 20 jarojn la maraj plantoj kaj animaloj, precipe koralaj rifoj pli kaj pli malmultiĝas. Pro varmiĝo de mara temperaturo, koraloj mortas. Li aĉetis jakton por vojaĝi diversajn marojn. Ne nur Aziaj sed ankaŭ Oceaniaj insuloj. Li vidis en la maro, kie abundas plastaj aĵoj forĵetitaj. Li multe observas la situacion de maro, kaj ekhavis danĝeran senton.

Longe li administris kompanion, kiu gvidas plongistojn, sed finfine li forvendis ĝin. Antaŭ 3 jaroj li decidis komenci propagandan agadon por protekti maron kontraŭ malpurigo kaj varmigo.

En la jaro 2020 la NGO Green Peace elektis lin kiel ambasadoron por protekti la naturon.

Kun familiano li ekhavis vendejon nomatan “ecostore papalagi”, kie oni povas aĉeti sekuran

manĝaĵon; senmedikamentan aŭ organikan legomon (<https://ecostorepapalagi.com/>).

Krome lia vendejo traktas senplastajn aĵojn, celante malmultiigi plastajn.

Tie ofte okazas lekcio, prelego, spektado de filmoj. Li okazigas eventojn; observado de strando por infanoj en marbordo de urbo Hayama. Kaj por plenkreskuloj, li organizas krozadon per jakto al Pacifika Oceano.



Mi nun tradukas la retan version de “Zagreba Metodo”

NAMBA Fumiharu

Lastatempe iutage, de Koreio al Japana Esperanto-Instituto (JEI) oni retletere demandis pri la reta versio de “Zagreba Metodo”, nome lernometodo de Esperanto, elpensita de e-istoj en Zagrebo. La letero estis transsendita al la estraranoj kaj deputitaranoj.

Jen estas ĉefpaĝo de la reta kurso de “Zagreba Metodo”. <https://learn.esperanto.com/>

Antaŭ kelkaj jaroj, s-ro Georg kaj lia projekto kreis tiun retejon, kaj multaj volontuloj partoprenis respondinte lian proponon por tradukado al aliaj lingvoj. Nun jam troviĝas multaj lingvaj versioj tie. Rigardante aziajn lingvojn, la kursoj jam pretas en korea, ĉina(ambaŭ simpligita kaj tradicia), vjetnama, tajlanda, indonezia, ktp. Tamen ankoraŭ ne estas japana versio!

Mi opiniis ke la japanaj esperantistoj tuj rapide kreu la japanan version. Kial la japanaj samideanoj lasis kaj malfruis por tiu multlingva projekto?

Unue mi mem legis la dokumenton “Kiel traduki al nova lingvo”. Kaj mi eksciis la detalan manieron. La kreado kaj tradukado estas progresinta kaj progresanta sur la sistemo “GitHub”, kiu kutime estas uzata por kreado de softvaroj per propraj projektoj.

S-ro Georg jam bonege pretigis la ejon en GitHub por tiuj, kiuj volas volontule traduki la kurson al sia lingvo. Por la japana lingvo, jam troviĝas dosierujo por tradukendaj dosieroj, kaj la ĉefa dosiero (manuskripto de la paĝo “Enkonduko”) estas jam tradukita al la japana per iu korea kunlaboranto...

Mi sendis retmesaĝon al s-ro Georg, kaj membriĝis al la projekto. Uzmaniero de GitHub estas relative facila por eksa inĝenierio kiel mi. Unue mi tradukis facilajn dosierojn en la ujo “vortaro”. Tiuj dosieroj estis kiel:

- unu: one
- du: two
- tri: three

kaj la tradukado estas simple reskribi la anglan parton al Esperanto. (Parenteze, por tiu dosiero “cifero.yml”, mi nur kopiis samnoman dosieron el la ĉinlingva versio!)


Post kiam mi bone kutimiĝis al la maniero, mi dissendis rete la proponon helpi la tradukadon. Feliĉe, s-ro Uĉigaki en Tiba Esperanto-Rondo eniris la tradukadon. Li tute diligente kaj rapide tradukis multajn dosierojn!

La progreso de tradukado bonege rapidiĝis dank’ al s-ro Uĉigaki. Mi devis ree rapidigi mian tradukadon pro lia rapideco. Mi ĉefe tradukis en la dosierujo “gramatiko”, kaj mi ĵus finis.

Nun, ĉiuj dosieroj estis tradukitaj. Kaj prova versio de japanlingva kurso estis aŭtomate pretigita. Nia nuna tasko estas provi la kurson kaj plibonigi la tradukaĵojn.

Do, bonvolu provi la kurson. Kaj se vi trovas iajn erarojn aŭ malbonajn tradukojn, sciigu al mi, kaj mi korektos!

<https://learn.esperanto.com/ja/>



la papera versio, antaŭe farita de jokohama-anoj